

Mediæ noctis tempus est

Brevier-Himno

Ordinara tempo > 2-a kaj 4-a semajno > dimanĉo > horo de la legajoj > nokte

*Mediæ noctis tempus est;
prophetica vox admonet
dicamus laudes ut Deo
Patri semper ac Filio,*

Nun estas nokto-meza temp',
admonas nin profeta vort',
ke laŭdon kantu ni al Di'
la Patro, Filo kaj Spirit'.

*Sancto quoque Spiritui:
perfecta enim Trinitas
uniusque substantiæ
laudanda nobis semper est.*

Ĉar ĉiam indas je ador'
la plej perfekta Triunu':
en tri personoj unu Di',
de ni laŭdenda en etern'.

*Terrorem tempus hoc habet,
quo, cum vastator angelus
Ægypto mortem intulit,
delevit primogenita.*

Teruris ĉi nokt-meza hor'
por Egiptujo, ĉar l' anĝel'
alportis morton kun pere'
al kiu ajn plej aĝa id'.

*Hæc iustis hora salus est,
quos tunc ibidem angelus
ausus punire non erat,
signum formidans sanguinis.*

Sed por la justaj estis sav'
ĉi horo, ĉar la mortigant'
ne batis, kiam vidis li
la sangon sur la supra sojl'.

*Ægyptus flebat fortiter
tantorum diro funere;
solus gaudebat Israel
agni protectus sanguine*

L' Egipt' funebris kun plorad'
pro tiom da kruela far',
sed per la sango de l' ŝafid'
ŝirmita ĝojis Izrael'.

*Nos verus Israel sumus:
lætatur in te, Domine,
hostem spernentes et malum,
Christi defensi sanguine.*

Nun ni, la vera Izrael',
jubile ĝojas, Di', en Vi.
Spit al malbon' kaj malamik'!
La sang' de Krist' defendas nin.

*Dignos nos fac, rex optime,
futuri regni gloria,
ut mereamur laudibus
æternis te concinere.*

Plej bona Reĝo, faru do
nin indaj je l' futura glor',
ke laŭde ni prikantu Vin
en Via regno en etern'.

Amen.

Amen.

latina T: anonima, 5-a jarcento

E: Albrecht Kronenberger 2008